

eLIBRO

*Ferenc Szilágyi*

# Tra mia prismo

*Tradukoj*



INKO

*Ferenc Szilágyi*

**TRA MIA PRISMO**

*Tradukoj el diverslingvaj literaturoj*

eLIBRO

*Aranĝis: Franko Luin*

**ISBN 91-7303-009-0**

*inko@omnibus.se*

*<http://www.omnibus.se/inko>*

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

NOVEMBRO 2000

## Edeno

*E. A. Karlfeldt*

## I.

Jen mateno, jen Edeno,  
kort' benita, juna ter'.  
Nigra sturn' kun gaja veno  
nestos sur la juniper'.

Vento ludas, bovo dancas  
kun koket'.  
Salto, tret',  
inter tigroj sin balancas.  
Sur la dorso de l' vultur'  
turto provas al lazur'.

Nuda, blanka la mastrino  
paŝas ĉe l' ĝardentabul' .  
Jen sambuko, pizo, lino,  
fabo kaj papavo-brul' .  
Dika pork' en idilio  
vekas sin,  
flegas sin,  
inter abrotan', salvio

snufas pala naz' al roz';  
sur petalo – ruĝa – ros'.  
Kaj Adam' kun mastra teno  
sub la flava prunoarb';  
junĉevalo sen rimeno  
kuras vigle preter garb'.  
Eva pomon alten svingas.  
Post ŝi mil  
floroj. Bril'  
ŝian bruston ĉirkaŭringas  
kaj eternas la maten'  
oriente en Eden'.

## II.

Staras ŝi pente sub ruĝa nub',  
palpas al sia folio-jup'.  
Li en kalsono verda  
ĝemas – dolor' inertia.  
Ĝoje rikanas sur l' arb' serpent',  
voston ĝi svingas – triumfa tent'.  
Flavpantalona kerubo  
levas hakilon al nubo.

Paco rompita – jen venis kriz',  
pezas seruro sur paradiz'.  
Devos li ŝvite rasti,  
devos ŝi krie naski,  
devos draŝiĝi en ĝem' la tent',  
krimon Kainan kompensi pent',

migros nur ili, ho longe,  
pensos pri l' hejmo nur sonĝe.  
For la mateno de l' firmament',  
venos frostnokto de l' okcident'.

*origine sveda*

## La birdo

*J. L. Runeberg*

Ŝi malfermis la fenestron.  
Ho, se bird' mi povus esti!  
Tuj mi flugus al ŝi tien,  
kaptus ŝi min, donus kaĝon,  
etan glason, puran akvon,  
kanabsemojn, ujon plenan.  
Sed mi dirus: Ne, knabino,  
ho ne akvon, ho ne semon.  
Sciu, via gaja birdo  
trinkas nure ĝojolarmojn,  
per kares' kaj kis' sin nutras.

*origine sveda*

## Sonoriloj sonas

*Hjalmar Procopé*

*(Novjara nokto, 1714)*

Sonoroj ondas por nova jar',  
ĉi jar' nur horojn rulas.  
Malluma estas kabanar',  
kandeloj ne plu brulas.  
Malsata lup' en urbo, kort'.  
Kiel novjare venos sort'?

Sonoroj ondas, la malproksim'  
malicajn novojn ĝemas.  
Jam filo lasta – varbviktim'.  
La pac' nenie venas.  
Kaj ĉie pan' el arboŝel' .  
Ho, kie lumas nun kandel' ?

Sonoroj ondas. La malicul'  
ŝtelvenas al la pordoj.  
Nin vidos pala aŭrorbrul'  
almozi ĉe la kortoj.  
Plenpeze sonas sonoril' .  
Ho, kiu dormas en trankvil' ?

*origine sveda*

## Kie mi

*Sándor Kisfaludy*

Kie mi – infano – vivis,  
fluis monta riveret',  
ofte ĝis vespero drivis  
min feliĉa rev-kviet'.  
Gaje en ĉi sorĉ-medio  
same kiel l' akvoflu'  
en senkulp' de l' sunradio  
mia vivo fluis plu.  
Tiuĵ tempoj for – jam funden,  
kiel akvoj enprofunden  
forfluadis. Mortemul' ,  
baldaŭ for la vivplezur'.

*origine hungara*



## Civilizo

*János Arany*

Sen principoj iam pri la  
militado oni agis.  
La pli forta trude premis,  
la venkito ĉion pagis.

Nun ne tiel! Jam la mondon  
konferencoj estre movas.  
Se la forta ajne kulpas,  
la kunveno ĝin – aprobas.

*origine hungara*

## Kvazaŭ mi

*Sándor Petöfi*

Kvazaŭ mi la tuta grandan mondon tenus,  
knabineto! – sub terura ŝarĝ' mi svenus,  
same nun mi tremas,  
kiam vian etan molan manon mi ekpremas.

*origine hungara*

## Letero venis

*Pär Lagerkvist*

De-hejme venis ĵus leter'  
pri ĉerizarbo, ribo, ter' -  
kun trema skrib' de aĝulin'.  
Patrino skribis ĝin.

Post vort' desegnis vorton pri  
sekalokresko, trifoli',  
pri Li kaj Lia zorga far'  
de jar' al jar'.

Jen sune staris kort' ĉe kort'  
sub gard' de l' firma dia fort',  
sonoris paco je vesper'  
el alt' al ter'.

Kaj estis spir' de ĝardenheĝ',  
lavendo kaj vespera preĝ',  
silenta festoharmoni':  
dimanĉe skribis ŝi.

Ĝi hastis tage-nokte por  
sciigi min en longa for',  
ke estas ĉio, pec' je pec'  
kiel de eternec'.

*origine sveda*

## Sun' subira – scen' plej bela

*Pär Lagerkvist*

Sun' subira – scen plej bela;  
ĉiu am' sature de la  
alt' kuniĝas en obskura lum'  
super arboj,  
super dom' kaj hum'.

Ĉies milda, amkaresa horo.  
Dio viŝas limon de la foro,  
baron inter alt' kaj tera grund'.  
Nia estas  
ĉio – kiel prunt'.

Ĉio estas mia – reprenota,  
ĉio de mi baldaŭ reprenota:  
l' arboj, humo, nuboj kaj mi nur  
ek-formigros  
sola kaj sen spur'.

*origine sveda*

## Vi mem ne estas...

*Pär Lagerkvist*

Vi mem ne estas, nur la viv' ĉe vi  
por vin viziti – nurmomenta gasto,  
por sin ĉe vi anonci kaj ne pli,  
ne ligas sin. Jam foras al la vasto.

La tago gajas, brilas sunradi'.  
Jen korjubil' ! Sed tio estas mi!  
La viv' vin tuŝis frunte, nur facile.  
Ne pli. Preteras, pasis jam flugile.

Jes, kion vi plej funde en la koro lulis,  
la ĝojdonac' aŭ vundo, kiu brulis,  
ne estas via, polvos baldaŭ vente  
kiel la vang', la sentoj evidente.

Ĉi vivo estas, kiu gastas nur  
momente dum senpaŭza, vibra kur',  
ŝanĝante polvon ĝuo kaj doloro,  
karnpecon – koron plena de angoro.

Al ĝi mi venu nun kun pia verso,  
al ĉi malplena er' de lama universo?  
Respektas mi neniel ĝian trud-edifon,  
estimas mi la homon, maltaksas mem la vivon.

*origine sveda*

## Mia fantazio

*Sándor Petöfi*

Kion oni diras?  
Ke sube sin movas  
mia fantazi'? Ĝi  
altiĝi ne povas?  
Ĝi marŝas sur ter' se  
tion ĝi deziras,  
eĉ sub teron ofte  
laŭplaĉe subiras.  
Ofte subakviĝas  
sub la marprofundon,  
pli ol ĉiu maro,  
en la koran fundon.  
Sed mi diras al ĝi:  
Ekflugu – jen aŭdo  
en la blu' ĝi kantas  
samkiel alaŭdo.  
Supren, fantazio!  
Mi tiel instigas  
ĝin kaj aglojn reĝajn  
ĝi ekrifuĝigas.  
l' agloj lace flugas  
malsupren al ruboj  
sed ĝi sen laciĝo

vetflugas kun nuboj.  
Eĉ ne restas nubojn  
ĝi akompananta,  
rekte flugas jam al  
ĉielo, la sankta.  
Kaj se ĝuste tiam  
migras la sunlumo,  
ĝi ekflugas preter  
malluma ĉi suno.  
Ĝi ekflugas preter  
la suno nigriĝa.  
Rigard' nur! – revenas  
radiar'-pompriĉa.  
Mia fantazio  
eĉ nun ne ekhaltas,  
sed foran planedon  
plej altan alsaltas.  
Kaj kie ne regas  
jam Dio mondmova,  
kreas novan mondon,  
ĝi – la ĉiopova.

*origine hungara*

## Vojaĝbildo: Stokholmo

*Dezsö Kosztolányi*

En la sukero: malgranda orkulero,  
la flamoj flagras kaj: sibla hejtozumo,  
memor' sekreta el infanaĝo fora  
embuskas en la obskura milda lumo.  
Ekstere nigre pluvegas. Familia  
kaj fremda bildo – malnova. Kaj kontente  
arĝent-harkronaj, afable delikataj  
svedinoj aĝaj ridetas komplimente.  
Horbato milda. Ni trinkas nian teon,  
sub dentoj niaj la kekso krak-porozas;  
el la aŭtuno nun kiel blu' somera  
al mi blu-molaj rigardoj lume flosas.  
Silentas ĉiuj, kaj ankaŭ mi silentas,  
sed ĉi silentoj ne kunfandiĝas pare,  
ĉar estas jene: silentas ili svede,  
kaj mi hungare.

*origine hungara*



## Antikva porcelano

*Carl Snoilsky*

Artporcelanoj saksan reĝon ravis,  
kolektoverm' stimulis lin sen fino.  
Li volis kruĉon ĉinan – ĉar ĝi gravis -  
por ĝi gvardion donis al Berlino.

Soldatojn kvincent, kiuj brave pafis.  
La Prus' profitis el la skerm-rutino;  
por tiu lerto, forto, disciplino  
la reĝo ŝanĝe bluargilon havis.

Soldatoj kvincent kun harplekto kreta!  
"Absurda far' de frenezul' kompleta!"  
- vi diras - "tiel la afero estas."

Sed post la ŝanĝo pasis jam jarcento  
kaj bravaj kvincent koroj en la vento...  
La kruĉ' antikva sen difekt' atestas.

*origine sveda*

## La tago

*K. V. Böttiger*

Jen maten'. Spegula tagkrepusko  
golfe. Gaje kantis en la bosko  
birdoj. Mi petegis en embusko:  
Venu, venu am'.

Kaj tagmez'. La vento sven-senfortis.  
Mutis bird', soifa floro mortis,  
min en la ardo la sopiro mordis.  
For, ho for, l' esper'.

Jam vesper'. Malvarma nokt', obscuro  
kreskas en la kor'. For la lazuro,  
sun'. Mi ĝemas al la marpurpuro:  
Restu vi, memor'.

*origine sveda*

## Vesperkanto

*Hjalmar Gullberg*

Ripozas ĉio monda:  
infan' kaj balancilo.  
Jam falas formortonta  
la vort' de l' viro.  
De karno falas ŝelo,  
eĉ ĉesas eta bru'.  
Ne plaŭdas la kverelo  
virina plu.

Li, kiu regas, baras  
ĉi ĉion, teron, ondon,  
en man' kun glob' – Li staras  
kaj pesas mondon.  
Jen vibras stelo-ringo  
ĉe Lia kap', sed sub  
la nuboj sur la fingroj  
nur estas sang' kaj rub'.

*origine sveda*

## Noako

*Hjalmar Gullberg*

Grajnujon lavas sangdiluv',  
ĝi mergas herbon, fundon.  
Konstruu barkon kontraŭ pluv'  
por spiti la inundon.

Ne devas timi mia gent'  
kaj ĵeti sin en ondon.  
Ĝi semos grenojn, se la vent'  
nin ŝovos sur la monton.

Ne helpas nin la ŝanĝoplor',  
ne ĝemo kaj incenso;  
kamel' trankvila venu por  
model' de l' pacienco.

Persista estas vi, azen',  
vi hezitant' sur ponto,  
vi portos nin kun plena pen'  
al pinto de l' savmonto.

Enpaŝu bovo, hund', ĉeval' ,  
fidelaj, servopretaj!  
Tirbest', gardbesto ĝojas al  
rikoltoj, kult' kvietaj.

Muzik' nin levu en batal'  
ĝis venos matenlando;  
alaŭdo, turdo, najtingal' ,  
savontoj de la kanto.

Kaj noktvelanto en boat',  
fuĝanto mondo-dronon,  
vi vidos ĉirkaŭ Ararat'  
la novan sunokronon.

*origine sveda*

## Mi estas ĉiel

*Dezsö Kosztolányi*

Mi estas ĉiel enregistradita,  
min priregistris ĉiaspeca list',  
en ŝim-odora, griza oficejo  
pri mi okupas sin la oficist'.

Ho dentknarigo, ho malhumiligo!  
Mi vivas sen libero en karcer',  
ne estas mia eĉ la man', eĉ kapo,  
piedo; ĉio estas nur afer'.

Prefere vivus mi en la dezerto  
aŭ putrus sub la ter', sub morta pist',  
ĉar estas ĉiel mi registradita  
kaj min prinotis ĉiaspeca list'.

*origine hungara*

## La aŭrora stelo

*Jenö Heltai*

Por kis', por dolĉa kis' de via buŝo  
mi portis al vi la aŭroran stelon  
kaj en la kor' mi sentis la ĉielon,  
dum longe sorbis mi plezur-mielon  
por kunfandanta, arda lipotuŝo.

Sed jen, vin baldaŭ tedis ĉi juvelo,  
ĉi lum' argenta sur la lit-drapir',  
la brila, brile bela aŭrorstelo.

Vi flustris ruĝe: ĝenas min ĉi bril' ,  
mi, stulta, hontas en ĉi granda helo.  
Estingu lumon de l' aŭrora stelo.

*origine hungara*

## Leciono

### *Frigyes Karinthy*

Mi kisis vin por lecioni  
kiel vi devas kison doni.

Mi vin brakumis ĝis en svenon,  
por ke vi lernu ĉirkaŭprenon.

Mi ploris, genu-ĉirkaŭpreme,  
kredante, prenos vi komprene

ĉi larmojn; bolan pagon pro la  
pri mi verŝita ploro bola.

Mi ĵetis ĉion for – jen sciu,  
kiela estas am' al iu.

Al kiu donus vi, pli ĝoje  
ol al vi mem kaj donus vi centfoje.

Ja, por vi morton pretus mi elporti,  
por ke, kiel mi kredis – vi ja pruvis –  
vi vivu kaj ne devu por mi morti.

Heziti, pri vi timi, vi ne devas,  
nur la senpaga don', sen pag' ricevas.



Mi diris: mi vin amas, kaj vi ĉu?  
Jen estis tuto de l' instru'.

Jen la sekret' – nenio plias,  
sed ne al vi, se vi ne scias,

ve, se l' rezulto de l' regulo  
kaj de l' ekzemplo iĝos nulo.

Ja, ne naskitus ni prefere,  
ol ke ni nin ne amu vere.

*origine hungara*

## Iam kaj nun

*Anna Maria Lenngren*

Malsatis iam mi, kaj mankis eĉ la pan',  
ne havis mi moneron kaj ĉesis la kredit',  
nun havas manĝon mi, eĉ monon en la man',  
sed ĝui ne plu povas, ĉar for la appetit'!

*origine sveda*

## Malfeliĉo en la amo

*Anna Maria Lenngren*

Tri amatinojn perdis mi.  
La unua en morton svenis,  
la duan ruze per pasi'  
rivalo venka de mi prenis.  
Pri l' tria vi demandas min?  
Ŝi estas nune la edzin'.

*origine sveda*

## Verkita ĉe tablo, kiam akcidento okazis

*Anna Maria Lenngren*

Ĉiun kreon sekvas fin'.  
Sama sorto pelas min.  
Por memori jen admono:  
mar' sekiĝos, dronos trono,  
regno ĵusa jam ruin';  
sunojn blinda nokt' enfermas,  
mondoj iĝos nur gruzer'.  
Kial do min nun konsternas,  
ke rompiĝis mangteler'?

*origine sveda*

## Ĉe la dancejo

*Birger Sjöberg*

Trilu la fluto  
kaj basu bastubjo,      (*Korno*)  
bretoj klaku,  
barstangoj kraku,  
mi vin albraku,  
ke en mi bivaku  
ĉi bild' bunte vigla ĉe bastubja tono.      (*Korno*)

Fuĝas honte,  
sed tre volonte  
karinoj al ies frata brust'.

Fulme ĉe l' abiar'  
la kornetoj klaras,  
ĝojas la koro, ĉar  
gajo malavaras.  
Frida kun fajra lum'  
sur vango kaj kun flamo  
vidas: el danco nun  
forŝtelas karojn l' amo.

Trilu la fluto  
kaj basu bastubjo.      (*Korno*)  
Bretoj krakas,

barstangoj grakas,  
tamburoj klakas  
ĉe son' de l' korn'.

Palas Dancestro,  
li tamen petolas:  
gvid' kun sperto,  
nobela lerto  
en fum' kun certo  
al loga verdo  
li glitas jen ŝmire kaj lante repaŝas  
ruze penas, (Korno)  
ŝin firme tenas,  
kiel faras pri l' kudrilet' magnet'.

Post salta spiroperd'  
Selfarist' mielas,  
ĉap' pajla sur la vert',  
ĉemizbrusto ŝvelas.  
Ho, kia pompa par'  
el Plezurlando ekstra!  
Batas, ho, mia kor',  
la kor' ĉe l' flanko maldekstra.

Palas Dancestro,  
li tamen petolas:  
gvid' kun certo,  
el fumdezerto,  
kun sperta lerto:  
Nun ek al la verd'!

Morna, decida,  
sed certa, memfida (Korno)  
Blomström gruzas  
la paroĵn, uzas  
perforton, muĝas,  
diktas, priruzas,  
li kvazaŭ portus droninton ĉe l' bust'. (Korno)

Ŝi tre palas,  
okul' vualas,  
protesto falas,  
ŝi sekvas plu.

Puding' kun hasta sving'  
saltas de l' knabino,  
ŝvebas ŝi en la ring',  
sekvas lin ĉe l' fino.  
Artas en danc-nirvan'  
je ĉies mir' – konsterne -  
Puding', la stokholman',  
ja dancas nur moderne.

Morna, decida,  
sed certa, memfida,  
Blomström gruzas  
la paroĵn, uzas  
perforton, muĝas,  
kiel tempest'.

Trilu la fluto  
kaj basu bastubjo.      (*Korno*)  
Jupoj ondas,  
la ritmoj fontas;  
ravigon montras  
kaj reve songas  
fermitaj okuloj ĉe bastubja tono.      (*Korno*)

Tukoj viglas,  
trinkaĵo siblas,  
barilo vibras  
dum polka salt'.

Frida, ho kun mi mem:  
per gracia stelas,  
sur maro de l' ĝuem'  
brave mi padelas.  
Fajras la trombon-lum',  
blindige ĝi ekfulmas.  
Vekas sin ventozum',  
ĝi notfolion turnas.

Trilu la fluto  
kaj basu bastubjo.      (*Korno*)  
Frida finas,  
sin lace klinas.  
Nektaro glimas  
dum kant' de l' korn'.

*origine sveda*



## Dezerta floro

*Nils Ferlin*

Nun ŝi jam atendis streĉe. Ŝi esploris.  
Poste premis mian manon: "Vidu, tamen ĝi ekfloris."

Estis ŝia aĝa kakti, mi apenaŭ kredis vero,  
dum la plej malluma tempo ĝi ekpompis kun fiero.

Nun ĝi floras – antaŭ morto. Sed ni ja nenion timis.  
Panjo iom gorĝmalsanis, kiel vintre ŝi kutimis.

Kaj ŝi diris en la lit': "Mi fartas bone. Preskaŭ sane.  
Mi ja sciis, ke ĝi floras. Vi ne kredis tion. Vane."

"Jes," respondis mi. "Ja strange, fine tamen vi pravas.  
Mi ne sciis, ke la kakti tian brilan floron havas."

Ni ĝin havis tiom longe, sen imago, ke ĝi floras,  
iam, ie en la mond' kaj jen ĉi tie ĝi odoras.

Kaj fratinoj miaj venis, haltis, mire ekridetis.  
Ili diris: "Ke ĉi kakti floras, ni neniam kredis."

Brilis klare kaj silente antaŭ mort'. Tiel okazis,  
ke dezerta floro donis lumon en la hejmo,  
kiam panjo nin forlasis.

*origine sveda*

## Kien la sango de Kristo?

*Pál Gulyás*

Kiam la Roman' enpikis  
pintan lancon – sin eligis  
dorse la kruela ŝtal' , krude ŝiranta  
la karnerojn ruĝajn de la kor';  
kiam ĉesis la korbato,  
kiam fluis tiu sang',  
- diru, ne hezitu lang' –  
kien fluis tiu sang'?

- Laŭ verŝajno sorbis ĝin la sablo,  
kiel ĉiun fluidaĵon  
ĝi kutimas; sablo trinkis, laŭ probablo.  
- Sed li estis Dia fil' el dia mond'.  
Sur du ŝultroj liaj ja ripozis  
la stelara horizont'.

- La tero ja ne fanatikas,  
ĝi ne atentis eĉ la nubojn.  
- Nenion priadoras la ter'.  
Nur trinkas sangon kun prefer'.  
Nur trinkas sangon kun prefer'.

*origine hungara*

## La infano volas ludi

*László Mécs*

Kupeo-kestoj, la trajno bruis;  
mallarĝa loko. Infan' enuis.  
La frua flu' ne toleris trudon.  
La flu' inundis. Li volis ludon.

l' infano serĉis al si spegulon;  
rigardis ride patrinokulon;  
patrinokul' lin ne respegulis:  
malgajulin'. La spegul' nebulis.

l' infano serĉis al si spegulon,  
rigardis ride nun li rentulon,  
ties okuloj lin ne spegulis:  
kalkul' , negoc'. La spegul' nebulis.

l' infano serĉis al si spegulon,  
knabin' spegulis junfeliĉulon.  
Okuloj amaj lin ne spegulis.  
Sopirvualo. La spegul' nebulis.

l' infano serĉis al si spegulon,  
la konduktoro gardis regulon,  
rigardo lia sensente foris.  
Servisto griza. Li ja deĵoris.

l' infano serĉis al si spegulon,  
alridis min. Mi l' etan ĉarmulon  
spegulis. Kiel en lago steloj:  
luliĝo. Kantis ie anĝeloj.

Mi havas tempon. Mono min ne ĝenas,  
pro ama febro mi ja ne tremas.  
Se venkis mi en mi jam la krimon,  
rigardas pura mi; ne havas timon.

Spegul' mi estas al ĉiu rideto,  
mi vivas nur, por ke mi ridetu  
arbaron, flugon, arbuston, rozon,  
ĉu lupon, ŝafon, ventfuriozon,

ĉu lunon, sunon, malriĉon, plagojn,  
suferon, gajon, alternajn tagojn,  
floreton, krucon – por rerideti al ĉio.  
Rerideti al Dio.

## Foiro

*Nils Ferlin*

Bruo, brand' kaj foirej',  
volu nur atenti!  
ĉu en korbo via – hej -  
estas var' por vendi?

Liliput' kaj gigantin';  
svingo kirlas krion,  
multpedaj kok', bovin'!  
ĉiu trovas ĉion.

Estas supro de l' plezur',  
grandioze vagi.  
Eblo estas ĝui, nur  
oni devas pagi.

*origine sveda*

## Somerlumo

*Verner von Heidenstam*

Vi mir-mirakla somertag',  
de kies lum' mi varmas  
irante padon en mola vag' -  
sovaĝaj rozoj svarmas.

Jen glimas lag' en kruta sub',  
speglas verd', monteroj,  
silenta grimpas kapro-trup'  
ĉe l' nigraj juniperoj.

Radiu lum' eĉ tra polen'  
de via ter' de riĉo.  
De vi min gvidas al vi en  
ĝoj', ĉi via feliĉo.

*origine sveda*

## Mi protestas

*Tamás Falu*

Por malsani, maljuniĝi  
en ĉi mond' nur mi ne estas.  
Mi protestas kontraŭ Tempo,  
kontraŭ Morto mi protestas.

Kaj skribe mi apelacias,  
motivaro jen ĉi-kune:  
amo, kant', feliĉ', dometo,  
flor' printempe, dolĉ' aŭtune.

*origine hungara*

## La stelo

*Rudolf Nielsen*

Jen la limo, iu diris,  
estas vane migri plu.  
Sen utilo ni nur iris  
en la blu'.

El batalo – kia gajno?  
Ni ja estas kelkaj nur.  
El prudento kreskos grajno,  
ni multiĝos laŭ natur'.

Se ni kreskos, tempo venos,  
justo venos kaj fortun'  
poste mem kaj nin pribenos.  
Sed ne nun.

Halton do, jen ni ektendu.  
For l' armilo kaj la zon'.  
Ni ripozu kaj atendu  
ĝis ni estos milion'.

ĉi mezuloj do kvietis,  
laŭ prudent' ne marŝis plu.  
— Sed et-eta grup' ridetis  
al la blu'.



El la rando de l' ĉielo  
sorĉobri levis jam  
sin ilia propra stelo  
kun instiga alta flam'.

Jes, ĉi grupo en naivo  
spitas al la risk', potenc',  
ke ekĝermu en la vivo  
ĝia pens'.

Baron rompas, vojon provas  
kelkaj al la land' de l' mir',  
kontentigi ĉar ne povas  
ĉiun nure la sopir'.

*origine norvega*

## Verdfolia, blanka

*Sándor Petöfi*

Verdfolia, blanka  
akacio flora;  
staras blondulino  
bluvestita, pro la  
pluvo sub ĝi. Ties  
finon ĝi deziras.  
El la korta pordo  
mi ŝin priadmiras.

Venu kolombeto,  
ŝirmu vian veston,  
sidu en la dom' sur  
nian grandan keston.  
Ĝi tro alta estas?  
Helpos mi, knabino!  
Ĉu malmola estas?  
Molas mia sino.

*origine hungara*

## En la arbaro de Vál

*János Vajda*

En arbaro praprofunda,  
urtikaro herb-abunda  
de l' azil' kaŝita Vala,  
ombrodensa kaj vuala.

Ho, kiele estus bone  
vivi tie monotone  
en dometo, en azilo  
vivi pace en trankvilo.

Plu ne zorgi pri la mondo,  
pri mizeroj de l' mondrondo.  
Kaj pripensi sur la limo,  
kio venos en proksimo.

Pri la nuboj meditadi,  
en printempaj floroj vadi  
kaj rigardi sur la monto  
en estinton, al estonto.

Nevideble, jar' post jaro  
el la seka foliaro  
de l' vivarbo je la fino  
fali al la tera sino.

Kaj en nekonata tombo  
endormiĝi sub branĉ-ombro,  
plu nenion voli por mi,  
nur ripozi, dormi, dormi.

*origine hungara*

## Sorĉa lago

*Tamás Emöd*

Dekdu arbhakistoj en arbaron iris,  
dekdu arbotrunkojn en amason tiris.  
Tagan manĝon portis la edzinoj klaĉaj,  
dekdu virinetoj, panjoj maljunaĉaj.  
Sorĉa, sorĉa, sorĉa lag',  
sorĉa, sorĉa lag'.

Dekdu arbhakistoj iĝis soifintaj,  
ĉerpis el lago ĉe la ondoj tintaj.  
Kiam saton ili trinkis sub la branĉoj,  
ili rejuniĝis kiel la fianĉoj.  
Sorĉa, sorĉa, sorĉa lag',  
sorĉa, sorĉa lag'.

Kreskis la okuloj de la panjoj etaj:  
Vidu nur, ĉu tiuj – tiel junaj, netaj?  
ĉiuj dekdu sur la balailojn saltis,  
nur ĉe l' bordo de la sorĉa lago haltis.  
Sorĉa, sorĉa, sorĉa lag',  
sorĉa, sorĉa lag'.

l' edzoj longatempe ilin reatendis,  
trovi la edzinojn ili deve sentis.

Kiam vagas ili ... horon sekvas horo,  
frapas la orelojn, aŭdu, infanploro.  
Sorĉa, sorĉa, sorĉa lag',  
sorĉa, sorĉa lag'.

Jam vespero estis, sonoril' sonoris,  
dekdu suĉinfanoj sur la bordo ploris.  
Apenaŭaj signoj restis post la panjoj,  
ili trinkis ĝise, iĝis suĉinfanoj.  
Sorĉa, sorĉa, sorĉa lag',  
sorĉa, sorĉa lag'.

*origine hungara*

## La du mortintoj (1915)

*Tamás Emöd*

Sur la brankardoj kuŝis du mortintoj,  
al Varsovi' la ĉaro amble knaris.  
Kaj jen ĝi haltis antaŭ mortbarako,  
kaj kvazaŭ ili jam de ĉiam faris,  
la du mortintoj ja nenion sentis,  
nur kuŝis tie, kuŝis kaj silentis.

El Rusa-lando estis ili ambaŭ,  
sur ambaŭ kapoj simpla soldatĉapo.  
La patro de l' unua: sklav, muĵiko,  
de l' dua: an' de l' generala stabo.  
La du mortintoj ja nenion sentis,  
nur kuŝis tie, kuŝis kaj silentis.

Soldato venis, serĉis en la poŝoj.  
Kopekojn dek li trovis ĉe l' muĵiko,  
cent rubloj en la poŝ de l' princo estis.  
Jen mon' sufiĉa eĉ por dom' el briko!  
La du mortintoj ja nenion sentis,  
nur kuŝis tie, kuŝis kaj silentis.

"Fremdaĵon lasu" – al si jene diris,  
li trinkis brandon, tamen venkis pekojn,

sed centon al la patro de l' muĵiko,  
li sendis al princpatro dek kopekojn.  
La du mortintoj ja nenion sentis,  
nur kuŝis tie, kuŝis kaj silentis.

*origine hungara*



## Silenta vespero

*Jarl Hemmer*

Kiel mil griloj kantis printempa pluvofal'  
ĉe lagspegul' silenta, senflua songo-pal' .  
Subtile-mole birdo pepetis sur betul'  
kaj longe fajfis en la pluvnebul' .

Jen estas hor' silenta, jen vivu tion vi,  
nenio ĵus okazis, okazas tamen pli.  
La pluv' kaj birdo jen kantis ĉe la voj'.  
Kunportu, eble ĝi helpas vin je ia foj'.

*origine sveda*

## La naiva kampulo

*László Szentjóni-Szabó*

Tie, ĉe l' montregiono  
en vilaĝa sia domo  
la patron' komforte sidas.  
Li leteron antaŭvidas.  
Por ricevi ĝin la moŝto  
viron sendas al la poŝto,  
kun promes' de trinkomono  
por plenumo de l' ordono.

Kruĉ' da vin' ne estas nulo:  
tuj ekkuras la kampulo  
por demandi pri leteroj  
ĉe la poŝt'. En man' moneroj.

Du leterojn "poŝto" trovas,  
ilin antaŭ lin li ŝovas.  
Sed la prezon Paŭl' ne konas:  
"Nu, por kiom du vi donas?"  
La poŝtisto ride miras:  
"Og grejceroj" li rediras.

"Ho sinjor', ap'teka prezo!  
Kvar sufiĉas, jen la mezo.

Ok? Duona taga peno,  
preskaŭ jam duonguldeno.  
Bonapreze mi aĉetos,  
ĉi paperojn ni forĵetos.”

Tiu diras: ”Tu leteroj,  
mi nur volas og grejceroj.”  
”Kion do? Mi donos seson,  
kiu pagus tian prezon?  
Sed mi pagas pro la estro;  
ne kverelu pri la resto.”  
La poŝtisto al la viro  
obstinega alrigardas:  
”Og grejceroj kaj ne partas.”  
Paŭlo: Al mi, veterano  
restas jam malmulta pano.  
Multon danke mi jam glutis,  
kun neniuj disputis.  
Jen, german’, laŭ via plaĉo  
(Vendu al sorĉistinaĉo!).

Kiam li jam tamen pagis,  
dum la ”poŝto” serĉis, agis,  
al la tabl’ sin li ŝancelis,  
du leterojn kromajn ŝtelis.  
Kvazaŭ ĉion plenplenumis,  
li ekiris, ekpip-fumis.

La sinjoro lin ekvidas,  
demandante lin alridas:

”Nu, ĉu venis la letero,  
ĉu vi venis kun prospero?”

”Ho sinjor’, mi spertis multon,  
sed ne vidis tian stulton.  
Tia prezo por letero  
ne ekzistas sur la tero.  
Por du etaj skrib-paperoj  
- kredu al mi – ok krejceroj.”

”Aĥ, la poŝton vi ne konas,  
ĉie oni tiom donas.  
Kiel tion vi imagas?  
Fiksane prezon oni pagas.”

”Ho, sinjor’, ne bone agis,  
kiu la unuan pagis.  
Trofiere li pretendos,  
se li ĉiun varon vendos.  
La kutimon mi ne rompis,  
tamen la poŝtiston trompis.”

”Kiel do?” “Nu, dum li iris,  
venis, kuris, serĉis, tiris  
- dia puno aŭ favoro -  
sed valoron por valoro.  
Du leterojn mi kromŝtelis,  
al pli bona prez’ mi celis.”

La sinjor' ridege diras:  
"Kion per ĝi Paŭl' akiras?  
La leterojn vi ja tenas,  
sed ĉu al vi apartenas?"

"Sed, sinjor', ja estas klare,  
mi ja havas Fejervare  
fraton, kiun antaŭ jaro  
trude varbis soldataro.  
Al li ilin – kun aldono  
pri l' bonfarto de l' patrono."

*origine hungara*

## La jaro de l'teruro

*Ragnar Jändel*

Mi elrigardis al la mondo;  
apokalipsa fluo  
de l' monstroj hurlis. Sed alaŭdo  
sin levis al la bluo.

Kadavroj kuŝis sur la stratoj  
kaj putris rube pesto;  
ankoraŭ floris tamen bedoj  
de l' sankta pensmajesto.

Torente ŝaŭmis en la urboj  
la sango de la Homo,  
sed time krucojn de l' karuloj  
karexis florokrono.

Disfalis mondo je atomoj,  
ruinis ĉiu mur';  
infan' kun flor' en haroj tamen  
ridetis, ludis nur.

*origine sveda*

## La plej bela kanto

*Ture Nerman*

La plej belan kanton pri am' neniam  
rulis la pres-instrument',  
kanta song' montmartre-a ĝi estis  
de pariza, pala student'.

Ĝi sonadi devus en la tutmondo,  
brulus printempa flamo, se  
ĝi sonus, la mondo al sia koro prenus  
lin, la novan Musset.

Estus li revanta ĉe ŝtono de kajoj  
kun gracila, lazurokula Lucille,  
kantus pri violoj kaj pri kisoj  
en la nokto de april'.

La plej belan kanton pri am' neniam  
rulis la pres-instrument'.  
Tombo amasa ĝin Flandrie kaŝas  
kun pariza, pala student'.

*origine sveda*

## Kiam oni min riproĉis

*József Erdélyi*

Kiam oni min riproĉis:  
"Knab' vi estas nur!"  
Mia koro eksopiris  
esti plenaĝul' !  
Sed nun por junec' sopiras  
kor' de l' plenaĝul' ,  
kial oni ne plu diras:  
"Knab' vi estas nur!"

Falas ombro sunleviĝe  
al la okcident',  
falas ombro sunsubire  
al la orient';  
norden ĵetas sian ombron  
varma, suda kur'...  
Aĥ, la homo vivas ombre  
de la Dio nur.

*origine hungara*



## Benzino

*Henry Parland*

Mi estas granda Dio  
kaj mia prezo estas 3,40 litre  
kaj la homoj ekstermas unu la  
alian pro mi.

Huui!  
kiam la fajro kisis min  
kaj la fero tremas: "Viv'!"  
Tiam  
scias mi,  
kial tiel longe mi  
sonĝis sub la tero.

*origine sveda*

## Venontnokte

*Gunnar Björklund*

Venontnokte, venontnokte  
estos la kosmo finverkita,  
ĝi estas ultimato kaj mi kuras  
inter la linioj.

Mi demandas junulojn, mi demandas oldajn:  
tridek naŭ jarojn mi iris studante  
kaj vi riproĉas.

Kion mi scias en la vortotorento?

Mi ne povas stari,  
ĉio ŝanceliĝas.

Venontnokte ĉio, kion mi scias,  
disfendiĝos.

Tio estas ultimato kaj mi demandas  
pri io, kio staras honestfirme  
- en ĉio.

*origine sveda*

## Spiralvojo

*Jenö Heltai*

Sur kamelĝiba  
montvoj' malmola,  
sur spiralvojo  
mi amblas sola.  
Ĝi nun ekkuras,  
nun sekvas vojfalo  
de val' de monto  
de l' mont' al valo.

Nuboj ĉe limo.  
Senfin'. ĉielo.  
Arbar' ruĝrusta  
kaj kluz' – muelo -  
kaj kie pinto  
ĉielon tuŝas,  
ruin' malhela  
nebule kuŝas.

Sun' kvankam brilas,  
jam palas rido  
kaj pretas al la  
aŭtun' la lito.  
Odor' disforas.

Al kaparĝento  
ŝvebigas brunajn  
foliojn vento.

Ŝvebigas florojn  
la vent' aŭtuna,  
vesper' alvenas,  
nubiĝo bruna.  
Nubiĝo bruna,  
silenta ploro  
al rusta herbo,  
al griza koro.

Kaj ree venas  
la nubo migra,  
ve, venis frue  
la nokto nigra.  
Mallonga vivo!  
Ni adiaŭos.  
Hier' forkuris,  
jen, jam morgaŭos.

En blinda migro  
sur spiralvojo  
al koro venas  
junulmalĝojo.  
Junulmalĝojo,  
junaj sopiroj,  
neplenumitaj  
junaj deziroj.

Iamaj amoj,  
iamaj tremoj,  
senkisaj noktoj;  
en kor' poemoj.  
Songoj junstultaj,  
espero pala  
min nun revenkas  
sur voj' spirala.

Sopirojn, kiujn  
forviŝis fino,  
mortintoj karaj  
el tomba sino.  
Dum nokt' vagantaj  
ĉielanimoj  
min nun brakumas  
ĉe krutaj limoj.

Jen mil memoroj,  
jen cent fantomoj  
sur voj' spirala  
susuras sonoj.  
Fornebuliĝis  
post ni jam ĉio:  
muel' , mont' , arboj,  
vivo, pasio.

Mi amblas sola  
ĉe la spiraloj.

Kvazaŭ mi irus en  
pasintaj jaroj.  
Nun ĝi altkuras,  
nun sekvas vojfalo  
de l' val' al monto,  
de l' mont' al valo.

*origine hungara*

## Oggi

*Mihály Babits*

La sun' dimanĉa falis al la kort',  
virino sola sidis ĉe la pord'.  
La ombrojn ŝiris ĉie brila fend',  
senvente svenis flora, laŭbotend'.  
Inertis teren rozoj, kiel la du  
virinoj ĉe la tombo de Jesu'.  
Vidiĝis tie laca riveret',  
dormeme fluis, pace en kviet',  
kaj kiel preĝas ĉe la tomb' por larm'  
parencoj, klinis branĉo sin en varm'.  
Batadis lante la virina kor',  
respondis zume sonorilsonor',  
malĝojon batis koro de l' virin',  
dormemon donis sonorila rim'.  
Muel' eterna, trista, klaka bru'  
en l' urb' malĝojo, tie ĉi enu'.  
Ho kiel ĉio varmas en fajriĝ'  
de ĉiu brusto fali eĉ negliĝ'  
dezirus, kiel la petal' de l' tig',  
lilioj ĝue velkas en vertig'.  
Jen ŝi oscedis, dormis la ĝarden',  
ne vibris tra ĝi eĉ hirtiga trem'.  
La hor' pasadis super la virin'

kaj svenspiregis la ĝardeno sin',  
ĉar Dio varme surblovetis ĝin.

*origine hungara*



## De animo al animo

*Arpád Tóth*

La supran nokton ĉe l' fenestro mi  
rigardas kaj tra l' vasta arkĉiel'  
kunigas en okulojn miajn la  
trembrilon mildan de forspaca stel' .

Tra spaco nigra, frostdezerta ĝi  
jen venis al mi ĉi senlaca flam',  
veturis bilionajn mejlojn kaj  
ĝi kiom da jarmiloj migris jam.

Mesaĝ' ĉiela, kiu fine nun  
al celo venis, al okula vart'  
kaj mortas milde, dum surfermas mi  
la ĉerkfermilon lacan de l' rigard'.

Mi lernis iam, ke per filtro tra  
kristala instrumento de l' kemi'  
la lum' ĉiela nin sciigas pri  
atom', parenca al la ter' kaj ni.

ĉi lumon ŝlosas, sorbas mi je sang',  
atentas en medito, en silent'  
praplendon kian ploras ĝi al mi,  
ĉiel' al ter' – al si la element'.

Doloras l' astrojn eble la solec',  
orfeco sola en la vasta spac'?  
Ke trans glacio, foro, nokto eĉ  
ne trovas ili nin en frata pac'?

Ho, kial plori, stel' , pli fore vi  
ne estas ol la homa kor' de kor'.  
Ho, kiu dirus, ĉu de Sirius'  
aŭ hom' distancas oni plie for?

Ho ve, vi anim', ho ve, amikec',  
ve, vojo de l' animo ĝis anim'!  
Mi sentas lacajn lumojn de l' okul'  
kaj inter ni: la frosta malproksim'.

## For la bravo

*Simon Kemény*

La purpuron temp' ĉifonis,  
ora rid' de l' tero dronis,  
kron' forfalis, ĝojperdanto  
iĝis gnom' el Tergiganto.

La papav' de sano, sango  
velkis for jam de la vango.  
Frost' venenis songĝ-aromon  
kiel verm' la belan pomon.

Iam turnis sin, nun stumblas,  
iam kantis ĝi, nun grumblas.  
Mankas karb' al varmosento  
kaj glaci' al freŝa vento.

Dikan ŝinkon ĝi ne ligas  
al fumtub'. Ĝi ne pretigas  
hejman brandon. Jam ĝis fino  
gutis la bongusta vino.

El la astroj ĝi plej posta,  
sen labor', malmultekosta,  
staras ĝi en aĝoklino  
ĉe l' ĉiela vilaĝfino.

Bravegulo, grandsinjoro!  
Estas for jam via gloro.  
Portas dors' heredan punon,  
plumbopelton, la maljunon.

Kiel korv' ĉe l' besto morta;  
aŭ ĉevalo lac-malforta,  
ĝi sin turnas, stumblas, tretas,  
sur la kamp' de Di' vegetas.

Sur dorsaĉ' la homo sidas;  
kien fuĝi, li ne vidas;  
restas, dum ĝin plagoj batas,  
ĝis lin Dio ekkompatas.

*origine hungara*

## Domflanke...

*Gyula Illyés*

Domflanke, side sur la "alsubtegmenta grado"  
mi aŭdas tiajn vortojn: mi kaptas vin, tomato!  
kaj tranĉas vin duone – kaj poste bis – duone,  
je tiel! Kaj nun saltu – ŝup – en la supon. Bone!  
La avinet' babilas senĉese kvankam sola,  
ŝi kredas, ke neniu ŝin ĉe la supo bola  
atentas... sed eĉ tiam, kiam ŝin vidas oni,  
al aĵojn ŝi ne hontas intimajn vortojn doni:  
He, fajro, ne friponu, nu?, jam silentu vere,  
la manon ne ekmordu kiel la kok' kolere!  
Plenmanon nun da salo; he, kie vi, saltaso?  
Mi portos tuj hejtaĵon el nia branĉamaso.  
Terpomo, vi varmiĝos, vi ne bezonas tremi!  
Obstina branĉo, kial vi nun ne volas veni?  
Ŝi iras ĉe l' fruktarboj senĉese diskutante  
kaj tiam brilaj branĉoj kliniĝas al ŝi kante,  
ŝin ekkareas ame kaj alsusuras varme,  
folioj etaj ridas plezure, ĝojolarme  
kaj supre, kiel pastroj hostion sanktan, sunon  
krepuskan nuboj metas en incensplenan fumon.

Ho, Dio, vin kaŝanta en arb', en kampo-sino,  
kiel ridet' embuskas en ama junulino,

Vi, kiu pli malfermis ol tiujn de poetoj  
l' orelojn de l' avino al viaj sonsekretoj:  
mi kvazaŭ surda stumblis kun raŭka kri' ebria  
post vin en ĉi nigrega, turniĝa mond', vizia,  
kiel al ŝi, ke vin ĉi vort' alondu,  
kuraĝe vian vorton simile mi respondu.  
Jen la vespera ruĝo, ĉi tiu best' giganta  
nun miajn ŝultrojn lekas, sin super min klinanta,  
kaj sub la morusarboj el supaj sep teleroj  
al vi ekŝvebas pie ĉielen fum-oferoj.  
Ho, vidu, la gardantoj de via vort' kaj rido  
sekreta plenabundas de varma, milda kredo:  
do kiel tiun lastan hebrea vespermanĝon,  
ho benu suferintojn, ilian vespermanĝon.  
Kiu en grenon, arbon la sangon verŝis ŝanĝe  
- la vian - kaj aldiris: jen al vi, prenu manĝe,  
permesu, ke min via pacema vort' saturu  
kaj tiel tiuj Dekdu, de via flam' mi brulu.

Jen la riveroj bluaj l' alvenan nokton kribras,  
pro l' malvarmeta fluo folioj ade vibras.  
Mi morgaŭ ekforiros. Ho, la sekreton diru,  
ke mi kun arboj, akvoj kunbabilanta iru  
kaj kun la ar' senscia, kies mi estas ido  
kaj kiuj al sinjoroj balbutas eĉ per vido,  
tiel senpovas ili. Min benu per la forto:  
kompreni, komprenigi min, se eĉ sen vorto.  
En mutaj trajtdemandoj la sencon mi retrovu,  
al la demandoj klaraj respondi mi ekpovu,  
kaj miaj vortoj kiel la vortoj de l' avino

sonoru plie ĉiam, sonore kaj sen fino,  
senpense pri la rido, senpense pri la moko:  
ne aŭdas oni ankoraŭ voĉon de l' kora voko.  
Tutklare kiel petaj okuloj de etuloj  
priploras min la mutaj, malgrandaj stelo-buloj,  
anstataŭ floroj ili dum nokto min konsolas  
por doni esperfloron en nokt', kiam mi solas.  
Samkiel mil okuloj sekrete en sorĉligo  
demandas rosogutoj sur verdoj de l' brasiko.  
Jen do, vojaĝi preta mi sentas en malhelo:  
rigardo sorĉa al mi radias kiel stelo:  
sub rido kaj larmantaj rigardoj, koraj fortoj  
stimulas reciproke sin vagemaj vortoj  
en mi, ke min preninte ili per forto fera  
konduku en ĉi tiu konfuza diso tera.  
Mi, kiu ĉe la flanko de humila, eta domo  
stariĝas de la bole varmega fund' – mi homo,  
timanta rigardadas, tremanta kaj medita  
supozi mi kuraĝas: mi estas elektita.  
Duflanke al mi branĉoj lunlumaj sin klinetas  
kaj al la vojo nigrajn bukedojn sternoĵetas.

Singarde, inter bedoj – terpomplantoj – mi paŝas,  
en bedoj nestas fruktoj, songvarmo ilin kaŝas.

Mi iras sen adiaŭ, se mi ekriverencus,  
kokidarĝente ili ploreti tuj komencus.

*origine hungara*

## Letero al mia edzino

*Miklos Radnóti**Verkita en koncentrejo antaŭ martirmorto*

Misteraj, mutaj floroj en la valo.  
Ululas la silent' en mia mensĝangalo.  
Mi krias vane, surde – sen respondo:  
Serbio kuŝas svene. El la fora mondo  
jen via voĉo traplektas songon mian;  
tagiĝis jam, sed ĝin mi aŭdas ĉiam.  
Silenton do, dum ĉirkaŭ mi ekzumas  
filikoj fiertigaj kaj min alpalpumas.

Ho, kiam povos vin mi vidi nove?  
Vin, kiu firma estis, psalme, ĉiopove  
kaj bela kiel lumo, kiel ombro bela,  
eĉ mutan vin mi trovus, eĉ en blind' malhela.  
Vi kaŝas vin ĉi tie. Al okuloj por mi  
vi ŝvebas el-en, mens' vin povas formi.  
Vi estis vero, sed nun revo sankta.  
En puton de l' knab-aĝo refalanta.

Ĵaluza mi postulas amkonfesion,  
vi donu kiel iam la promeson  
pri ligo nia. Glimas amespero,



oscedas ree puto de la vero:  
mi scias, ke vi jam edzino estas;  
landlimoj tri, sovaĝaj tamen disarestas.  
Aŭtunas jam. ĉu velk' min plu katenos?  
ĉu bild' pri nia kis' – pli akra venos?

Miraklojn kredis mi, sed estis jam delonge;  
grenadĵetiloj vicas alte kaj oblonge.  
Okulobluon vian supre mi admiris,  
sed bombflugantoj ĝin en nigran nubon ŝiris -  
atakopretaj. Sed mi tamen spiras.  
Kaptit' mi estas; kion mi aspiras,  
mi juĝas sobre. Tamen, foj' post fojo  
mi marŝas sur l' anima longa vojo;

mi migris landojn en ardaĵ' purpura,  
se devos, min mi sorĉos tra la nura  
flamar' por spiti ĉion, hejmen veni,  
mi povos kiel krusto min alkroĉe teni.  
Valora, pli ol armilar', potenco,  
trankvil' de krudaj viroj en danĝerodensio  
trankvilon donos al mi. Kvazaŭ nokta flu'  
envolas min la sobro de l' duoble du.

*origine hungara*

## Vintra vespero

*Lörine Szabó*

Alvenis Loci, fil' trijara  
kun ventmordita ruĝa vango,  
la urson ĵetis li kaj laŭdis  
la mondon lia eta lango,

ke fumas nazo de l' ĉevalo,  
ne falis li de la glitilo;  
genuojn miajn eksurrampas  
por elrigardi mia filo.

Ho, kial li reveni devis?  
Avide brilas la okuloj  
vidante kiel ekdancigas  
libelojn neĝajn ventoluloj.

Babilas li, mi sentas kiel  
koreto pulsas sub la mano,  
mi pensas pri kapreolido,  
arbaro, lupo, uragano,

milito, plago, defenmanko,  
pri ĉio, kion mi sur stratoj  
mem vidis ĵus veninta hejmen.  
Pri ĉiuj krudaj sortobatoj,

pri ĉiu vundo de la mondo,  
pripensi eĉ pli ol malbone,  
ĉar kion mi esprimi povas,  
min igas ĝemi angortone.

- Ho, Paĉjo, kiel bela vintro!  
La knab' raviĝas kun aplaŭdo.  
Ho estus bone al li kredi,  
al ĉi senscia ĝojo, laŭdo.

*origine hungara*

## El "Opus incertum"

*Gunnar Ekelöf*

Kion ni vidas, aŭdas, sentas, pensas estas malpli  
ol ĉies duono.

Kion vi ne vidas, aŭdas, pensas estas pli ol la alia duono.  
Vivo estas balanciro sur la linio inter ili du.

Fikcia linio inter ĉies duono kaj duono alia.  
Sensignifa plankfendeto; ŝnuro, kiu ne ekzistas!  
Ĝuste tial li, lamanta ekvilibr-artisto, falegos iam  
en ambaŭ, kion li scias kaj ne scias.

La eterna fine tio ne estas, kio estas aŭ ne estas.  
La eterna estas la bela provo kaj ĝia vaneco,  
la bela sekvas en la konscion pri ties vano.

*origine sveda*

## La senmorteco de la animo

*Mihály Csokonai Vitéz*

*(Parto)*

Esti aŭ ne esti, dubo plej problema,  
kies solvo estas cerbumiga, prema;  
kiam la demandon turni mi esploras,  
al la fund' profunda nova mi ekboras.  
Vidas, ŝaŭmas menso, tremas kor' en timo,  
ĝemas en la dub' tordita homanimo.  
Sentas min mi nobla, kaj nun jam inerta.  
Kovras nub' l' esperon, la dubo jen certa.  
Kiam mi ĉielen, vivan koton ŝovas,  
dian flamon en ĝi mi apenaŭ trovas.  
Inter stelojn portas min flugil' etera,  
borden de la tombo trenas membro tera,  
kaj mi pendas inter la ĉiel' kaj tero,  
mi – anĝel' aŭ besto, aŭ nur gut', polvo.

Se mi estas, vivi mi eterne devas,  
se mi mortos, kial do sufero revas?  
Se la vivo pasos, kial nia ter' do?  
Kial la espero antaŭ certa perdo?  
Sole por suferi, havi mil dolorojn,  
sole por kalkuli en ekzil' la horojn,

sole por sopiri al pli glora lando  
kaj neniam iĝi ties atinganto?  
Por sufer' mi estu, por la vivon penti,  
eĉ espero servu nure min turmenti?  
Tiel mi sopiras la Nirvan-azilon.  
Ter' – uteren prenu vian lacan filon!

Feliĉul' centoble neniam vivinta,  
al la font' de l' vivo ne prisoifinta.  
Ve al la vivanto, kiu ekis spiri,  
pun' funebra al li en nenion iri.  
Ne estante ĝuon mi ne konus por mi,  
povus en sonĝbrakoj nekonataj dormi.  
Sed, se ekfajreris en mi vivflamo,  
tuj ekbrulis la – al ĝi tiranta amo.

Esto! ĉiellando eĉ en ter-mizero!  
Eĉ sen sent' ne-esto – vi mem la infero!  
Staras mi nun en la florinsul' de l' vivo,  
meze de ondŝaŭmo, pinte de montrifo,  
vidas mi la duban foron de la bordo,  
fluan de la viv' aŭ finon de la sorto.  
Sub mi klakas grince dent' de l' elementoj  
el la faŭk' kaosa muĝas blekaj ventoj,  
sorĉo proksimigas al mi ostomanon:  
"Vi pereos!" krio tranĉas l' uraganon.  
Sed ĉe la kurteno blua de l' esperoj  
ridetante brilas jam la frataj steloj  
indikante, ke el alto la animo venas.  
la plibono vivas, se mi korpon senas.

Ho, vi dolĉaj sentoj de la eterniĝo,  
kiuj nin fortigas per konsol-feliĉo:  
por la eterneco jam komenco: tio  
kion mi nun sentas en la fantazio.  
Kaj vi, kiu same taksas eston, agon,  
kiu studas viajn forton kaj imagon,  
kiu ĉirkaŭ vi jam konas mil aferojn,  
ties formojn, kvantojn, ties manierojn;  
juĝi vi kuraĝas, al vi ne sufiĉas  
jam la ter', aero, kiu vin provizas,  
sed vi ĉirkaŭ vi mem kreas mondon, novon,  
simiante la laboran ĉiopovon.  
Vi, per kiu kreas, agas mi, plenumas,  
juĝas kaj konscias, sentas kaj cerbumas,  
esperadas, ĝuas, ploras mi en timo,  
vi real' mirakla en mi mem, animo,  
direktanto de ĉi polvomaŝineto,  
di' kreita al liliputplanedo!  
Ekmeditu, studu, vin al vi elvolu,  
ĉerpu poste forton, vian eston solvu!

*origine hungara*

## Nokt' feliĉa

*Sándor Petöfi*

Nokt' feliĉa! – Mi kaj mia belfloro  
nin amuzas en ĝarden' je nokthoro.  
En silento nur la hundoj ekbojas;  
surĉiele,  
fee, bele  
steloj, luno brilvojas.

Mi neniam estus bona noktstelo.  
Mi ne restus por la nokt' sur ĉielo.  
Ne amuzus min anĝela kanthoro.  
Je vespero  
vin sur tero  
mi vizitus, belfloro!

*origine hungara*



## Taglibro

*Anna Maria Lenngren*

Dimanĉ': amas mi ĝismorte.

Lundo: esprimas sin doloro.

Mardo: respondas ŝia koro.

Merkred': ni amas tute-forte.

Ĵaŭdo: ŝanĝemas flirtulino.

Vendred': mi ekhurlas venĝokrion.

Sabat': fervore gluglas vino.

Dimanĉ': forgesis mi jam ĉion.

*origine sveda*

## Mi estas amanto

*Harald Fors*

mi estas amanto de la nuancoj  
amiko de la nedifinita  
sindonanto al la misteroj  
mi jam sentis kison de la letargio  
kaj aŭdis ĝian flustron  
mi estas amanto de la nuancoj

*origine sveda*

<http://www.omnibus.se/inko>

**ISBN 91-7303-009-0**